# LA INFORMILO

**

INFORMBULTENO PRI ESPERANTO

BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCIO

Editeur: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République - NANCY
(CCP: 1997-72 U NANCY)

trimestriel
nouvelle série
n° 9
1er trimestre
1975



abonnement
un an: 6F
le n°: 1,25F
(1 jaro: 6 internaciaj respondkuponoj)

# LA VITALITE de l'espéranto...

## *LES CONGRES 1975

— En dehors des Congrès Fédéraux (pour l'Est de la France, les 15 et 16 mars à Staffelfelden) et Nationaux...

... *pour la France, à TOURS, du 28 au 31 mars,*
*l'Ecosse, du 13 au 15 avril à Glasgow,*
*l'Allemagne, du 17 au 19 mai, à Oberkirch,*
*la Suède, du 17 au 19 mai à Halmstadt,*
*la Grande-Bretagne, du 23 au au 26 mai,*
*le Canada, du 28 au 30 juin, à Calgary,*
*la Norvège, du 4 au 7 juillet, à Tromsø....*

les espérantophones du monde entier se retrouveront en 1975 en de nombreux points du globe pour y témoigner à nouveau de la valeur de leur outil de communication.

La liste que nous publions est bien sûre incomplète. Nous notons entre autre:

*60ème CONGRES UNIVERSEL d'ESPERANTO (UEA) à Copenhague, du 26 juillet au 2 août. C'est le plus important de l'année. L'Union Française pour l'Espéranto organise une "caravane" pour le Danemark (les intéressés peuvent écrire à UFE, 4bis, rue de la cerisaie 75004 PARIS).

*31ème Conférence de la Jeunesse Mondiale Espérantiste, du 15/7 au 29/7, également à Copenhague.

*48ème Congrès de l'Association Anationaliste Mondiale (SAT), à LA HAYE, du 26/7 au 2/8

*27ème Congrès des Cheminots Espérantistes, du 10 au 16 mai, à Villach (Autr.)

*43ème Congrès des Aveugles Espérantistes, à Hilleröd, Danemark, du 20 au 26/7

# *LA RADIO

Nous n'indiquons dans ce tableau que les émissions facilement captées dans notre région...

EMISSIONS QUOTIDIENNES

| | | | |
|---|---|---|---|
| | VARSOVIE: | 6h - 6h30 | 200m 50,04m 48,90m |
| | | 16h30 - 17h | 41,99m 31,45m 31,01m |
| | | 22h30 -23h | -id- + 200m |
| DIMANCHE: | Sofia - | 9h30 / 9h55 | 49,42m |
| | Rome - | 21h / 20h20 | 41,24m 30,90m 50,08m |
| | Sofia: - | 21h05 / 21h30 | 50,61m |
| LUNDI: | Berne: - | 13h20 / 13h30 | 75,28m 48,66m 31,46m 19,44m 16,86m |
| MERCREDI: | Berne - | 13h20 / 13h30 | comme lundi |
| | Vienne - | 13h30 / 13h45 | 203m (le 4ème mercredi) |
| JEUDI: | Berne - | 22h45 / 22h55 | comme lundi |
| VENDREDI: | Pékin - | 21h / 21h30 | 43m 33m 31,25m |
| SAMEDI: | Zagreb - | 0h05 / 0h20 | 264m |
| | Pékin - | 21h / 21h30 | comme vendredi |
| | Berne - | 22h45 / 22h55 | comme jeudi |
| | Vienne - | 17h45 / 17h55 | 48,74m 16,87m |

ADRESSES DES STATIONS:

VARSOVIE: "Pola Radio" Esperanto-Redakcio Poŝtkesto 46 PL 00950 VARSOVIE
VIENNE: Radio-Vienne Esperanto-Elsendo Argentinierstr. 30a 1041 WIEN
SOFIA: Radio-Sofia Bulgarie
PEKIN: Radio-Pekino Esperanto-Fako PEKIN Chine
ROME: Radio Roma Esperanto Fako Casella Postale 320 I-00100 ROMA
BERNE: Svisa Radio CH 3000 BERN 16 Suisse

*— Nous prions nos lecteurs d'écrire aux différentes stations, SI POSSIBLE EN ESPERANTO. Approbations, suggestions ou critiques sont également les bienvenus. Vous aiderez ainsi à augmenter les temps d'émissions.*

*— N.-B. D'autres émissions des postes pré-cités ont lieu à d'autres heures de la journée. Après divers essais, il apparaît qu'elles ne peuvent être reçues dans la région Est de la France, même sur des postes élaborés. Nous signalons aux auditeurs éventuels que la meilleure réception est obtenue sur appareil muni de bandes d'ondes courtes "étalées" (Si votre poste comprend le "réglage fin"... les résultats sont souvent excellents).*

*

**BONNE ANNEE 1975 ! !**

*

# STAFFELFELDEN... apud MULHOUSE

## URBO DE NIA 34-A FEDERACIA KONGRESO 1975




INVITO AL LA 34-A KONGRESO DE LA ORIENT-FRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Sabaton la 15-an kaj dimanĉon la 16-an de marto 1975

*Nia ĉi-jara Federacia Kongreso okazos en la* Junuldomo de STAFFELFELDEN, je 10 km de MULHOUSE, *(kiel tio estis unuanime decidita dum nia lasta ĝenerala kunveno) ekde sabato post-tagmeze.*

*Al niaj kutimaj programeroj, ni deziras ĉi-jare aldoni ankaŭ* KULTURAN PARTON, *kaj por fari tion ni ekhavos la helpon de la Sarlanda Esperanto-Ligo, kies sekretario, S-ro Reinhard* HAUPENTHAL *pretas prelegi por ni pri la verkaro de D-ro* ZAMENHOF *kaj pri la rolo de la* PROVERBARO ESPERANTA.

*Ni firme esperas, ke multaj samideanoj, el kaj ekster nia Federacio, ŝatos partopreni tian programon. En Germanio kaj Svislando jam okazis pluraj kulturaj semajn-finoj kun multe da sukceso kaj entuziasmo. Dank' al ili ankaŭ progresis la Esperanto-movado ĝenerale. Ni esperas, ke ankaŭ en nia Federacio povos eknaskiĝi tiaj kenkontiĝoj por doni plian interesiĝon kaj samtempe allogi novajn samideanojn.*

*Tial ni plej kore invitas vin partopreni nian Federacian Kongreson ekde sabato post-tagmeze!*

## NIA PROGRAMO

**SABATON, 15-an de marto 1975**

15-a ĝis la 17-a: *Akcepto de partoprenantoj en la Junuldomo, 53 rue de Cendrillon, 68850 STAFFELFELDEN, kaj ĉe la stacidomo de MULHOUSE por veturigado al la Junuldomo.*

18-a: Komenciĝo de la kultura parto

19-a: Komuna vespermanĝo (10F)

20-a 30: Daŭrigo de la kultura parto (prelegoj)

**DIMANĈON, 16-an de marto 1975**

8-a 52: *Akcepto de novaj alvenantoj ĉe la stacidomo de Mulhouse por veturigado al la Junuldomo en STAFFELFELDEN.*

9-a 30: A/ Ĝenerala kunveno de la Orient-Franca Federacio.

- Raporto de la Sekretario
- Raporto de la Kasisto
- Raporto de la respondeculoj el diversaj urboj
- Debatoj pri tiuj diversaj raportoj
- Renovigo de triono de la federacia komitato

B/ Preparo de la nacia kongreso de UFE en TOURS.

- Resumo de la ĝenerala situacio de UEA kaj de UFE depost la Hamburga Kongreso 1974.
- Studo de la jar-raportoj kaj aliaj tekstoj.
- Proponoj, rezolucioj, voĉdonoj por la nacia kongreso, elekto de nia delegito al TOURS

- Studo de eventualaj modifoj en la statutoj de nia Federacio.

12-a: Akcepto fare de la Junuldomo, kun honor-vino, en ĉeesto de lokaj kaj regionaj eminentuloj.

12-a 45: Komuna tagmanĝo

14-a: Samtempe tri eblecoj:

- *Vizito al ekspozicio pri Afrika Arto (fronte al la Junuldomo)*
- *Komitata kunveno kaj elekto de nova estraro*
- *Ekzamenoj unua-grada, kaj se eblas ankaŭ dua-grada*

15-a: Prezentado de diapozitivoj pri Japanio.

17-a 30: Finiĝo de la Kongreso kaj reveturigado al la stacidomo de Mulhouse por la dezirantoj.

→ *Dum la tuta Kongreso okazos Esperanto-Ekspozicio kaj estos instalita libro-stando, kie diversaj esperanto-libroj estos akireblaj...*

* * * * *

La Junuldomo de STAFFELFELDEN, kiun estras S-r° TARANTOLA, senpage disponigos al ni salonon. Ĝi ankaŭ zorgos pri la manĝoj, la tra-nokt-eblecoj, kaj aranĝos honor-vinon, kun ĉeesto de regionaj eminentuloj...

*Ĉes pli nombraj ni partoprenos, ju pli sukcesa estos nia aranĝo, pri kiu raportos aŭtomate la gazetaro....*

*Ĉes pli nombraj la aliĝiloj, ju pli antaŭen ni puŝos ESPERANTO-n!*

* * * * *

## UTILAJ ADRESOJ:

*S-r° TARANTOLA, Direktoro de la M.J.C., 53 rue de Cendrillon, 68850 STAFFELFELDEN tel. (89) 48 42 06 (ne parolas Esperanton)*


*S-r° André GROSSMANN, Bât. D2, rue de la Doller, 68110 ILLZACH*

*S-r° Albert LIENHARDT, 24 Fbg de Riedisheim, 68100 MULHOUSE tel. (89) 44 75 21*

*S-r° Roland KUBLER, 20 rue du ruisseau, RODEREN, 68800 THANN tel. (89) 37 16 39*

## kiel atingi la kongresejon ?



# ALIĜILO AL LA KONGRESO

Sr°, S-in°, F-in° *

Adreso

Mi alvenos sabate / dimanĉe* je la horo, per

Mi rezervas manĝojn: *sabate vespere por personoj kaj infanoj.*

*dimanĉe tagmeze por personoj kaj infanoj.*

Mi petas rezervon de *1-lita(j) hotel-ĉambro(j) je 20F / 25F / 30F* *

*2-lita(j) hotel-ĉambro(j) je 30F / 35F / 40F* *

*lito(j) en komuna ĉambro (kun 4 litoj) 8F (kun maten-manĝo).* *

Mi estas kandidato por la nova komitato: *jes / ne* *

Mi deziras trapasi ekzamenon unu-gradan /dua-gradan *

Mi proponas, ke la 35-a kongreso okazu en

*(*bonvolu forstreki netaŭgaĵojn)* subskribo:

Mi petas vin resendi ĉi-tiun aliĝilon antaŭ la 1-a de marto 1975 al:

*S-r° TARANTOLA, Direktoro de la M.J.C., 53 rue de Cendrillon, 68850 STAFFELFELDEN (Fr.)*

---

VOĈDONO - RAJTIGILO

——> (por la ne-partoprenontoj) <——

(*sendenda al S-r° André GROSSMANN, Bât. D2, rue de la Doller, 68110 ILLZACH*)

S-r° / S-in° / F-in° *

Adreso

Ne povante partopreni la ĝeneralan kunvenon de la 34-a Kongreso, mi rajtigas voĉdoni anstataŭ mi, S-ron / S-inon / F-inon *
kiu ĉeestas ĉi-tiun kunvenon / aŭ la asembleon *

*(*bonvolu forstreki netaŭgaĵojn)* subskribo:

---

KOMITATA RENOVIGO:

La mandato de la 4 jenaj komitatanoj finiĝas:

*F-in° JACQUOT, S-roj BARIDO, CHAPELLIER, GROSSMANN.* Ili bonvolu anonci pere de la aliĝilo, ĉu ili kandidatiĝas denove aŭ ne, aŭ informi pri tio la prezidanton. Novaj kandidatoj bonvolu anonci sin prefere antaŭ la kongres-tago.

---

## AKTIVECA RAPORTO POR LA JARO 1973 - 1974

*La ĉi-jara Federacia-Kongreso (la 33-a) okazis en Mulhouse, en la restoracio "A l'Agneau d'Or", 19 avenue de Colmar, la 17-an de marto. Ĉeestis kvardeko de personoj inter kiuj amikoj el Germanio kaj Ĉeĥoslovakio.*

*La nuna membraro de nia Federacio nombras 112 kotizantojn fine de decembro, do la saman nombron kiel pasintjare, kun varbado de 25 novuloj, sed perdo de la sama nombro.*

*Kursoj ekzistis en STRASBURGO, gviditaj de S-r° ZIPFEL kun 8 partoprenantoj, en collège Lucie BERGER, kaj de S-r° BARIDO en "Ecole d'Application", kvartalo Rotterdam. Krome, kiel ĉiu-jare, estis organizita esperanto-renkontiĝo en LA HINGRIE, al kiu parto-prenis 2 samideanoj el Saarbrücken, gesamideanoj el Strasbourg, Mulhouse, Colmar Nancy, Liepvre.*

*Estas antaŭvidita la malfermo de biblioteko en la grupa sidejo, 4 pl. Mérian, kaj starigo de perkoresponda kurso ĉe la sama loko.*

*Por la joro 73/74 sukcesis la unua-gradan ekzamenon 6 lernantoj.*

*en NITTING, S-r° GROSJEAN, instruisto, gvidis depost marto 2 novajn esperanto-kursojn, la unua por plenkreskuloj (6), la dua por geknaboj (6). Ciuj plenkreskuloj fin lernis sian kurson, la plej junaj lernantoj lernis nur parton de la Junulkurso.*

*En BAR-le-DUC: la grupo kunvenis regule ĉiumonate - 7 gelernantoj, gvidataj de S-r° DENIS finlernis la kurson kaj petis novan superan kurson dum la venonta lernejjaro. La pet-letero sendita al 30 departementaj konsilantoj ricevis apogon de S-r° BEAUGUITTE, deputito-urbestro de VERDUN.*

*En SAINT-DIE, S-r° GODARD kunigis 9 lernantojn, kiuj finlernas la metodon "Steleto" kaj komencis de septembro 74 la lernadon de esperanto pere de la metodo "ASSIMIL", kiu daŭros ĝis junio 75.*

*En Ste-MARIE-aux-MINES, nova klubo kun 6 membroj kreiĝis en la liceo, dank' al S-r° MIQUEL, vic-direktoro. Li krome kontaktis 2 departem. konsilianojn, respektive en Bas-Rhin kaj Haut-Rhin, kun la celo voĉdonigi rezolucion favoran al E°.*

*En NANCY, la membraro konsistas el ĉirkaŭ 20 grupanoj kaj lernantoj, el kiuj 14 aliĝis al UFE, sed nur kelkaj kunvenis 2 aŭ 3-foje dum la jaro, laŭ ebleco de libera tempo, en neformala, amikeca renkonto. Tiuokaze la grupo akceptis 2 belgajn samideanojn kaj partoprenis du renkontiĝojn en Germanio kaj Alsaco, rilatis kun departementa konsilanto, ĉu vizite, ĉu letere, kun turisma servo kaj "Office Municipal de la Jeunesse rilatoj el kiuj, rezultis 2 anoncoj en la Jarlibro, helpo por multobligado (OMJ), kaj pago de deficito de la perkoresponda kurso, pere de la Junuldomo, de ĉirkaŭ 100F.*

*La grupo aperigis 94 artikolojn en loka kaj regiona gazetaro, kaj respondis 1 intervjuon de loka gazeto. Okazis 2 radio-komunikoj, kaj unu preskaŭ 10-minuta televida elsendo. Estis uzitaj 120 afiŝoj, 4400 flugfolioj, 1200 cirkuleroj en junuldomoj , junularhejmoj, sociaj centroj, liceo, magazenoj, aŭ enmetitaj en leterskatolojn. 3 prelegoj pri E° antaŭ 18 ĉeestantoj estis organizitaj, kaj unu ekspozicio vizitita de ĉirkaŭ de 300 interesituloj.*

*Funkcias 4 kursoj: 1 perkorsponda kurso elementa kaj perfektiga, 3 parolaj. Komencis la kursojn: 68 gelernantoj, finis: 11 ĝis nun, sed la laboro daŭras perkoresponde. Akiris diplomon: 9.*

*Kursoj gvidataj de S-r° COLNOT kaj F-in° MARCHAL en NANCY kaj 18 perkorespondaj kunlaborantoj laborantoj.*

*En MULHOUSE, la grupo nombras 10 membrojn kaj kunvenas unufoje ĉiusemajne en amikeca kaj konversacia rondo. Gi akceptis pollandajn samideanojn kaj rilatas kun grupo en BASEL. La grupo aperigis 6 artikolojn en lokaj gazetoj.*

*En EPINAL, finis la elementan kurson: 4 lernantoj, kaj la dua-gradan 3 gelernantoj.*

*Marcel BERGEROT*

=================

FINANCA RAPORTO 1974

| Enspezoj | |
|---|---|
| 105 kotizoj | 4889 F |
| 5 kotizoj GEE | 20 |
| Abono de esper. revuoj | 220 |
| Donacoj | 684,90 |
| Rentumo (ŝparkaso) | 16,35 |
| | 5830,25 |

| Elspezoj | |
|---|---|
| Repago de la kotizoj al UFE | 4513 F |
| " " GEE | 98 |
| " " JFEO | 57 |
| Perado de abonoj | 220 |
| Afrankoj Sekretariaĵoj | 363 |
| Materialo (kajero, stampilo) | 48,60 |
| Donacoj UFE kasisto | 240,80 |

| | |
|---|---|
| Propagando | 157,95 |
| | 5698,35 |

BILANCO

| | |
|---|---|
| | 5830,25 |
| - | 5698,35 |
| ⟶ | 131,90 F |

Eldonado de "La Informilo":

| enspezoj | | elspezoj | | |
|---|---|---|---|---|
| Abonoj | 659,80 | Multobligo "Inf." n°5 | | 84 F |
| | | | 6 | 156 |
| | | | 7 | 96 |
| | | | 8 | 149 |
| | | Sendado | 5 | 120,04 |
| | | | 6 | 69,75 |
| | | | 7 | 121,35 |
| | | | 8 | 63,30 |
| | | 1000 banderoloj | | 100 |
| | | | | 959,44 |

BILANCO

| | |
|---|---|
| enspezoj | 959,44 |
| elspezoj | 659,80 |
| deficito | 299,64 |

| *en la kaso je la 31/12/73* | |
|---|---|
| *ĝenerala kaso* | *654,87 F* |
| *"Informilo" kaso* | *137,53* |
| *Profito 74* | *131,90* |
| *Deficito "Inf."* | 299,64 |
| *en la kaso je la 31/12/74* | 624,66 |

A. Grossmann

## KIU DEZIRAS FARIĜI FEDERACIA PREZIDANTO?

Kelkaj personoj miris pro mia intenco eksiĝi el la prezidanteco de nia Federacio. Mi juĝas do utile doni la jenajn klarigojn.

Mi aktivas por Esperanto de 23 jaroj (per kursoj, parolaj sed ĉefe perkorespon-da) kaj de 17 jaroj mi aktivas por la Federacio, unue kiel sekretario, sub prezidan-teco de S-r° Royet, poste de S-r° Cuené. Mia celo tiam estis arigi en organizo jam ek-zistanta, sed preskaŭ mortinta, la lernantojn finantajn la lernadon de la perkoresponda kurso de la nancia junuldomo, kune kun aliaj diversdemenaj esperantistoj. El 60 da membroj la Federacio kreskis ĝis 120. De 3 jaroj mi akceptis la prezidantecon. Mi es-peris per mia konstanta laboro kaj miaj alvokoj, ke multaj membroj aktiviĝos, kaj ke E° kreskos en nia regiono, kune kun la membraro de nia Federacio.

Se laŭ federacia vidpunkto, la funkciado estas bona, ĉefe dank' al la perfekta laboro de S-r° Denis por la bulteno, kaj de S-r° Grossmann por la financoj, mi devas konstati, ke male diversaj aktivuloj ĉesis labori: parolaj kursoj okazas nun nur en Strasburgo (sed en tiu urbo devus esti pli da aktivuloj, kompare kun la membro-nombro) Bar-le-Duc, Nancy, St-Dié, Nitting. En Epinal kaj Mulhouse ĵus okazis malsukceso, sed en Thann, Guebwiller, Colmar, Bruyères, kie antaŭe ekzistis kursoj, laŭ mia scio ne-nio estas provita ĉi-jare, nek en aliaj urboj, kie vivas kapablaj esperantistoj. Ni ne forgesu, ke nia membraro stagnas nun ĉirkaŭ 110/112 membroj, kun varbado de 20/30 novaj membroj ĉiu-jare, sed perdo de sama nombro! Se la kursoj ĉesos, la varbado ne plu okazos kaj la Federacio baldaŭ regresos.

Mi akceptis aktivi por la Federacio en momento, kiam ĉio, kiam mi provis en Nan-cy, tiam fiaskis, eĉ la perkoresponda kurso malbone sukcesis. Mi opiniis do, ke mia devo estis laboti por la regiona Federacio, dum la tiam sukcesantaj aktivuloj povis

pli facile dediĉi sian laboron al loka agado.

Nu! Aktuale, jam de pluraj jaroj, mi povus sukcesigi ion en Nancy, kaj mi devas bremsi la perkorespondan kurson, ĉar la samtempa prizorgado de ĉio(parolaj kursoj, kunvenoj venoj, perkoresponda kurso, komunikoj al la gazetaro, la Informilo, ĉiuj decidoj pri la Federacio, rilatoj kun multaj personoj en Francio kaj eksterlande, ktp...) forrabas mian tutan tempon. Dum la tuta pasinta laborjaro, mi dediĉis al E-° de 10 ĝis 20 horojn ĉiusemajne, kaj mi ne estas emeritulo! Mi, ekzemple, devas vivi sen televido, ĉar tio malhelpus mian laboron por E-°...

Mi ŝatus do, ke nun, la aliaj personoj, kiuj ne plu laboras (aŭ ne plu sukcesas labori) en siaj respektivaj urboj por E-°, konsentu prizorgi la federacian laboron, por ke mi povu dediĉi pli da tempo al miaj problemoj en Nancy kaj por la perkoresponda kurso.

Kompreneble, ia seniluziiĝo, kaŭzita de mia nekapablo veki sufiĉe da laboremo ĉe multaj, ne estas tute fremda al tiu mia nuna deziro, sed tamen ĉiu devas kompreni, ke iu iu((mi aŭ aliulo!) ne povas konstante, kaj ĝis morto, barakti en tro multaj aferoj kaj dissemi ĉiudirekten energion, kiu ne estas elĉerpebla, kaj kiu pli utilus en nur unu aŭ du direktoj.

Krome, estas pli bone por ĝenerala aktiveco de iu ajn asocio, ke la gvidantoj ne estu ĉiam la samaj, sed renoviĝu komplete de tempo al tempo. Post 17 jaroj mi konsideras min "elĉerpita".

Mi tre esperas, ke la 4 personoj, kiuj kandidatiĝos aŭ rekandidatiĝos kiel komitatanoj de nia Federacio, tion faros kun la deziro labori por progresigi nian komunan aferon.

J.P. COLNOT

---

*PARTOPRENU RENKONTIĜOJN KAJ KONGRESOJN!*

PARTICIPEZ AUX RENCONTRES ET CONGRES!

Une circulaire en français est en cours d'impression pour les nouveaux élèves de nos cours. Réclamez-la en joignant une enveloppe timbrée à:

*ESPERANTO M.J.C. 27 rue de la République 54000 NANCY*

*Dum Pasko - JUNULARA RENKONTIĜO EN LUKSEMBURGO. En la "Eŭropa Domo" (en Luxembourg, Pfaffenthal, 6 rue Vauban). Organizata de Luksemburgia E-° Asocio kaj Germana E-° Junularo, de ĵaŭdo 27-a de marto ĝis mardo 1-a de aprilo, kompleta pensiono ĉirkaŭ 150 F.* Por informoj aŭ aliĝoj, skribi al Hans Dieter PLATZ, Maikammererstr. 21, D-6731 St-MARTIN (Rheinland-Pflalz)

*- NACIA FRANCA KONGRESO EN TOURS*

*- KONGRESO de S.A.T-AMIKARO en St-JUNIEN (Hte-Vienne).*

Skribu al: S-r° G. IMBERT, 10 impasse G. AYCUEPARSE, 19100 BRIVE la GAILLARDE

*La 3-4ajn de majo 1975, en la kastelo Junkerwalo, en BLIESKASTEL, Niederwürzbach ĉirkaŭ 20 km oriente de Saarbrücken, kultura semajnfino de la Sarlanda-Asocio.* Okazos kursoj A (por germanaj komencantoj) B (por progre sintoj ankaŭ franclingvaj), kaj C (prelegaro pri lingvo kaj psikolingvistiko far D-r° Tazio Carlevaro.)

Skribu al: Reinhard Haupenthal, Franz Schubert-str. 26, D 6602 DUDWEILER.

*Dum Pentekosto - GERMANA E-° KONGRESO en OBERKIRCH. (30 km oriente de Strasbourg)*

*Pli poste en Sarlando, du pliaj renkontiĝoj okazos, la unua kun prelego de Pr-° LAPENNA, la dua kun Luksemburganoj.... kaj vi ne forgesu la UNIVERSALAN KONGRESON en KOPENHAGO (vidu la front-paĝon) kaj la KONGRESON DE S.A.T.*

---

GRAVA ATENTIGO: Pro troa abundo da presendaĵoj kaj ĉefe pro la draste postulata limdato de aperigo de ĉi-tiu n° de la Informilo, ni estas devigataj provizore flankelasi la kutimajn rubrikojn: *NIA VIVO EN ...* kaj *PAĜO DE LA LUDOJ*.

Ni pardonpetas niajn legantojn.

La Redaktantoj.

Imprimé par les soins du Secrétariat des Associations, 12 rue Voltaire 55000 BAR-le-DUC
Le Rédacteur: P.DENIS. - Le Dir. de la public. : J.P. COLNOT - Dépôt légal n° 245.